

Feroaj baladoj tradukitaj en Esperanton

Martin Strid 2017

Tradukis baladojn dancatajn en Ferooj



El feroa lingvo:

- & Balado de Virgar, 3567 paŝoj.
- & Bresta balado, 1740.
- & Filino de Torkil, 1620.
- & Jalgrima balado, 2552.
- & Olav Rajdistrozo, 1537 aŭ 1696.
- & Petro sinjor' kaj Elinborg', 1624.
- & Sigmunda balado malnova, 2829.
- & Vilmunda balado, 2754.

•*Djurhuus:*

- & Drako Longa, 2523.
- & Sigmunda balado pli nova, 2366.

•*Schrøter(?)*:

- & Sigurda balado, 6600.

El dana lingvo:

- & Signhild Fiera, 589.

•*Storm:*

- & Sinklarkanto, 779.

Praskandinavoj



& Balado de Virgar (Virgars kvæði)

<Filmo 43>

(#: <:29> (/MiLa LaTi TiTi dore; redo doTi TiMi; LaLa TiiTiTi TiTi doore;re reedodo doTi LaTi; (#Rekantaje: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti doTi La a))x122)+(&:

'1 Pri luktuloj bonaj multaj ; prarakontoj temas ; famaj estis en fruepoko ; pri ili mi balademas.

(x: **Nun emas mi en danco jam iri ; dum rozoj, lilioj ; kreskadas tre.**)

'2 Mi kantas pri glavo Mimiring' ; kaj forta ĉevalo Skemingo ; kaj pri Virgar Volundido ; heroo de famaj atingoj.

'3 Virgar sidas en sia hal' ; konsilas ne rikana ; tenas kruĉon da bruna medo ; ambaŭ heroaj manoj.

'4 Virgar tiel ekparolas ; post batala brulo ; "Toleranta min manajn hakojn ; ĉu monde troveblas luktulo?

'5 Kiam sidas mi sur Skeming ; kaj Mimiringon komandas, ; ja neniu tiom bravas, ; nek vivon mi nek pacon marĉandas."

'6 Respondis unu el liaj knaboj, ; ruĝo vizaĝon tegas, ; "Ĉu vi aŭdis ke Tidrik reĝo, ; li burgon en Berno regas?

'7 Staris li en lukta lud' ; kie batojn herooj faras, ; se vi venas sub liajn hakojn, ; vi en danĝero staras."

'8 Virgar Volundido kolera ; larĝan tablon forpuŝis, ; ĉiuj tiuj karaj drinkaĵoj ; la halan plankon duŝis.

& Vilmunda balado (Vilmunds kvæði)

(#: <:34> (/fami sofa fami mire; rere dore mimi; miimimi fami fami faso; sofa
fafamii redo; (#Rekantaĵe: mimi fa mi re; reerere dore mi; mimi mimi mi fa;so
sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e))x81)+(&: <Filmo 42>

'1 Aŭ/skultu la baladon kiun ; bele
aŭdigas lango ; dum mi baladas pri
bataloj ; glavoj kantas en sango.

(x: **Dancu mastrino ; belan elektas
mi. ; Dancu min al mano ; ja bele
kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

'2 Nomata nome estis Jarmund ; reĝo
de Gardaregno* ; Jormund lia brava
filo ; malmultaj same degnas.

'3 Jormund estis reĝa filo ; taŭga en
ĉiuj portoj ; nomatas lia stala frato* ;
estis Vilmund forta.

'4 Estis moro en Gardaregno ; for en
arbaron iri ; iris ĉiu en sia klano ;
boacojn kaptakiri.

'5 Estis Jormund reĝa filo ; iris for
arbaren ; lin Vilmundo poste sekvis ;
ambaŭ por ĉason fari.

'6 Densa kaj malhela nebulo ; venis sur
la landon ; Vilmundo kaj reĝa filo ;
perdiĝis arbaron grandan.

'7 Iris en pli densa nebulo ; estis peza
paso ; vaste migris sovaĝarbaron ; ĉio
forigis de l' ĉaso.

'8 Jormund longe perde migris ; antaŭ
ke vojon trovis ; trafis poste al la pado ;
kaj kuri domojn povis.

'9 Aŭdis bruon kaj homparolon ;
aŭskultis por plia klaro ; reĝaj viroj sur
burgo staras ; vidis jen ŝiparon.

& Jalgrima balado (Jalgríms kvæði)

(#Sudinsula: <:29> (/LaLa Tido TiLa La3;Mi La Tido TiLa; dore mi3mi fami mi;mi redo mimi miLa; (#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a))x88)+(&: <Filmo 41>

'1 /Unu scias rimon mi ; el vortoj trafegaj ; Jalgrimo kaj Havgrimo ; en praantaŭo regis.

(x: **Tondru danco tre ĉarme ; nun tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; staras jen mastrino.**)

'2 Jalgrimo kaj Havgrimo ; regis per glava rando ; unu estis en Uplando ; alia en Bjarmalando :

'3 Sin konsilis ili kiel ; prauloj faris en fojo ; ke neniŭ reĝo regu ; norde de Herojo* :

'4 Venis malsupren al Bjarmaland' ; kvindek altaj rajdistoj ; kaj respondis Havgrimo: ; "Kiu estas ĉi gastoj?"


'5 Unu el la fraŭloj ridetis ; sub lino* respondis: ; "Harald reĝo de Norvegujo ; li al vi min sendis.

'6 Reĝo nin ĉi tien sendis ; ne pro milda frukto ; aŭ impostu teron vi ; aŭ kontraŭ ni luktu."

'7 Havgrimo parolon prenas ; diras lango kore: ; "Jen imposto neniŭ iris ; laŭ famo kaj memoro.

'8 Mi naskiĝis Bjarmalande ; teron mi ne impostos ; kaj do Harald reĝo li ; ne faru al ni kostojn."

'9 Elportis lian tablornamon ; faritan el pura arĝento ; "Prenu tiun ĉefon nun ; elportu en la venton."



& Filino de Torkil (Torkils døtur)

(#: <:27> (oso /sodo doododo rere so;so somi; sososo soso fami relmi; fa mimi re do; rere rere rerere soso somi; sososo soso faamimi remi; fa mimi re do)x60)+(&:

<Filmo 39>

'1 /Torkil* havas filinojn du, (x: – **ja danci** –) longe matene dormas plu. (x: – **Bone min ŝancis***, ; **jen mi volas plankon antaŭen danci**, ; **kvankam vi mian vivon minacis**, ; **bone min ŝancis.**)

'2 Dorme ili trankvilis, ĝis la liton suno brilis.

'3 Ili longe dorme kuŝas, ĝis la sunbrilo liton tuŝas.

'4a Torkil iras kabanon, vekas filinon bonan.

'4b Torkil iras al ĉambro, vekas filinojn ambaŭ.

'5 "Ekstaru, Katrin, mia filin', preĝejulo atendas vin."

'6 "Se li ne atendas, rajde lin forsendu!"

'7 Katrin sur lito sidas, longe ŝi vestiĝas.

'8 Ŝi surmetis silkan robon, naŭjunulinan manlaboron.

'9 Bluan mantelon sur ĝin supro, orfadeno en ĉiu kudro.

'10 Katrin sursidas litan stumpon, metas al si skarlatajn ŝtrumpojn.

'11 Skarlata ŝtrumpo kaj bona ŝu' blankaj manoj ĉe ŝultroj du.

'12 Katrin orkombilon prenas, kombas hararon kun silka rimeno.

'13 Ŝi kombas hararon kun silko eta, oran kronon ŝi supre metas.

& Olavo Rajdistrozo (Olafur riddararós)

(#: ((#Feroe: <2,3:4> /mi mimi mi mi /so solfa mi mi; /soso sofa mi i; /mi mi re rere /mi milre do Ti; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o) ? (#Islande: <1,6:29> /soososo do3so sola soso; mifa so mire do; soso sooremi fami dodo; mifa soso sofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do o))x53)+(&: <Filmoj 37, 38>

'1 (&Feroe: "/Kien vi rajdos, /Olav mia? (x:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;) /Supre pendas ki/raso via." (x:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!** ; /**Iru plankon, dancu kun /granda em'!**))

? (&Islande: "/Kien vi rajdos, Olav mia? (x:; **Se erar', li en star'** ;) Supre pendas kiraso via." (x:; **Kaj la ruĝa brulis fla2m'**. ; **Milde ŝarĝon li metis sub la montkruto ; milde ŝarĝon li metis sub la monta krut'**.)

'2a "Iros mi al sablarbaro sovaĝcervinan ĉason faros.

'2b Al sablejo mi vojaĝas ĉasos mi cervinon sovaĝan."

'3 "Ne cervinon ĉasos vi vi iras al via luda tili'

'4 Blankas ĉemizo via lavita en sango estos ĝi makulita.

'5 Blankas ĉemizo, el bona tranĉ' ĝin trafos poste sanga lanĉ'.

'6 Olav sin turnas de sia patrin': "Dio ne lasu pravigi vin."

'7 Olav rajdas laŭ roko antaŭen trovis li elfan domon jen.

'8 Olav rajdas laŭ roka dekliv' trovas li elfojn el masiv'.

'9 Elvenis jen elfin' plekta hararo ŝultris ŝin.




9/69

Sigurda balado (Sjúrðarkvæði):

Fabelo pri Sigurd la drakon mortiginto
notis Johan Henrik Schrøter (kaj verkis?) (Feroa Sudinsulo, 1822)
Nibelunga Ringo (1876), Wagner
Völsunga sagao (islanda, 1275)
Kanto de la Nibelungoj (germana, 1200)
Sigurda ĉizaĵo (sveda, 1000)
Aliaj runaj ĉizaĵoj

Kvar partojn:

1. Forĝisto Regin, '131-165 strofoj, 6100 paŝoj, 65' minutoj
2. Brinhilda parto '248 strofoj, 9100 paŝoj, 100' minutoj
3. Høgna parto
4. Batalo en Huna Lando



& Sigurda balado. Forĝisto Regin (1):

< Sigurda ĉizaĵo sur monteto
Ramsundsberget apud
Eskilstuna, Svedujo:>

<Filmo 31>

(#Melodioj: <1,6-1,8:37> ((# **Varianto A**: /mimi mire doTi LaISo; LaTi dore mimi; mimi lala la ti; tila sofa mimi; (#**Rekantaĵe**: mi mifa mi mire do La; LaTi doTi do rere mi mi; lala lala sofa mi; mi mifa mi mire do La; VoVo)) ? (#**Strejmoja**: /mimi mimi mimi mi; dodo dore mimi; mimi lala la ti; tila sofa mimi; (#**Rekantaĵe**: mi sofa mi mido Ti La; LaTi doTi do dore mi mi; lala lala sofa mi; mi sofa mi mido Ti La; h)) ? (#**Suduroja**: /mire mire doTi LaI Ti ; dodo dore remi; mifa somi so la; lala laso sofa; (# **Rekantaĵe**: mi sofa mi dodo Ti La; LaSi LaTi do dodo re mi; mila lala laso so; mi sofa mi dodo Ti La; mimi)))×168)+(&Strofoj:

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (2):


'1 /Ĉu vi volas aŭdi nun ; kion ĉi mi kantas ; pri la riĉaj reĝoj ; mi nun ek rakontos.

(x: **Griz portis oron de l' sablo. ; Glavon svingis li kun kapablo. ; Sigurd venkis drakon ja. ; Griz portis oron de l' sablo.**)

'3 Tiel gaje trinkas ili ; en la jula festo ; kaj tiel klare sidas ili ; seĝojn de altkresto.

'4 Malpaco iris ; al la granda halo ; kaj tiel ĝi fortiĝis en ; de riĉa reĝo valo.

'5 Tiam estis multe jen ; el riĉa homa rando ; malpaco iris al ; de riĉa reĝo lando.



& Sigurda balado. Forĝisto Regin (3):

'6 Malpaco iris ; en riĉan reĝan landon ; metas ili sian batalon ; sude ĉe maran strandon.

'9 Rajdas ili al batalo ; neniu venas re ; poste vivas Hjordujs ; en malĝojo tre.

< Ŝtono Gökstenen, Svedujo. >

'7 Rajdas ili al batalo ; suden sur la strandon ; bravaj fortaj gardis ili ; riĉan reĝan landon.

'10 Rajdas ili al batalo ; venas vivofino ; poste vivas Hjordujs ; Sigmunda edzino.

'8 Metis siajn boatojn ; sude ĉe la strandon ; tiom ruze gardis ili ; riĉan reĝan landon.

'11 Hjordujs ŝultras sin ; per blumantelo ; iris sur la kampo antaŭen ; al Sigmund celo.

'12 "Kuŝu sana Sigmund nun ; mia kara ; estas mi en malĝojtempo ; vin viziton fari.

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (4):

'13 Aŭdu alta Sigmund ; mia kara ; ĉu kuraca estas io ; por viaj vundoj bara?"

'14 "Malfrue por vi Hjordujs ; jen konsilan fundon ; al mi donu balsamon ; kuracan por mia vundo.

'15 Hunding-filoj en luktobruo ; faris vundon ĉi ; estis veneno en la glavo ; ili portis kontraŭ mi.


'16 Kiam al mi venis unua ; vunda tru' ; rompiĝis mia glavo ; en pecojn du.

'17 Kiam al mi venis ; dua vundo ; malbone apud koron ; hakas al profundo.

'18 Prenu vi ĉi tiujn ; glavpartojn du ; ilin al forĝejo ; portu la filo plu.

'19 Kion vi havas en utero ; estas knaba homo ; vi nutru lin al bona forto ; kaj donu Sigurd nomon.

'20 Pri filo nun jen ; por vi mia vorto: ; ĉi tiu sama filo ; venĝu mian morton.



& Sigurda balado. Forĝisto Regin (5):

'21 Regin forĝisto loĝas ; ĉe venonta flu'
; al li vi portu ; ĉi glavpartojn du.

'22 Forĝu glavon li el ĝi ; brilan en fasono
; ambaŭn fendi povu ĝi ; feron kaj
ŝtonon.

'23 Akra nomiĝas drako ; kuŝas Brilerike
; Regin estas bona forĝisto ; perfidas li
praktike.

'24 Mi ne povas Hjordujs ; longe paroli
vin ; jen devas esti mortmomento ; nun
venanta min."

'25 Turnis ploranta Hjordujs sin ; de
Sigmund for ; ĉiuj ŝiaj domaninoj ; staris
ĉe ŝi deĵore.

'26 Ĉiuj ŝiaj domaninoj ; apud ŝi lojalis ;
kiam edzino Hjordujs ; senkonscion falis.
.....

< Sigurdaj ĉizaĵoj sur preĝejporda kadro en Hylestad, Norvegujo. >

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (6):

'27 Tiam kiel ofte
plu ; venis ĝi en
hasto ; reĝo
saman nokton ;
serĉis Helon*
gasto.

'28 Ne malpli ol
tiam volis ;
Hjordujs kostojn
savi ; al la ondoj
ruĝan oron* ; lasis
al Sigmund havi.
.....

'29 Al la ondoj
ruĝan oron ; ŝi
lasis al li spesi ;
krucon el arĝento
blanka ; signon
por adresi.



& Sigurda balado. Forĝisto Regin (7):

'30 Oriente sub monteto kie ; knaboj ludas en lumo ; kadavron palan fosis ili ; malsupren en nigran humon.

'31 Oriente sub monteto kie ; knaboj venas paroli ; malhelas ĉi tenebran tagon ; malsupren en humon soli.

'32 Ploranta nun iris Hjordujs ; en sia halo sidi ; Hjalprek reĝo unua estis ; vidvinon jen viziti.

'33 Sigmund reĝo ; de Hjordujs iris ; Hjalprek reĝo ; poste ŝin akiris.

'34 Hjalprek reĝo ; de l' jarlo filo ; li nun ricevis, ; altrangan edzinon.

'35 Graveda la edzino iras ; longe naŭ monatojn ; ĝis venis tiu moment' ; ŝi naskas filon ŝatan.

'36 Graveda la edzino iras ; naŭ monatojn konajn ; ĝis venis tiu momento ; ŝi naskas filon bonan.

'37 Tiam kiel ofte plu oni ; kaŝas malfacilon ; iris edzino al alta ĉambro ; kaj naskas junan filon.

'38 Ŝi vestas lin per ŝtofoj bone ; kiam li venis en domon ; Sigurd tiel petis ŝi ; por bona knabo nomon.

'39 Tielis pri Sigurd ; multis lia kresk' ; pli li kreskis en monato ; ol aliaj infanoj en ses.

'40 Kreskis li ĉe sia panjo ; kaj sen ambigu' ; pli li kreskis en monato ; ol aliaj en dek du.

'41 Kreskis li ĉe sia panjo ; ŝi donis al li progreson ; lernis li pli en unu monato ; ol aliaj infanoj en ses.

'42 Kreskis li ĉe sia panjo ; fortis evolu' ; pli fortiĝis en monato ; ol aliaj en dek du.

'43 Kreskis li ĉe sia panjo ; bonis lin fortun' ; pli li gajnis en monato ; ol aliaj en dek du.

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (8):



'44 Kreskis li en tiu regn' : als viro de domin' ; Hjalprek reĝo ; edukis lin.

'45 Kreskis li en tiu regno ; rapide kaj ne lante ; fariĝis liaj hakoĵ pezaj ; reĝajn virojn batante.

'46 Li elstaris en ludkampo ; sub la ŝildo ruĝa ; lernis ĉiun ruzon kiun ; oni konkurse juĝas.

'47 Li elstaris en ludkampo ; en konkursabundo ; ĉiam kiam ili pretis ; estis multaj vundoj.

'48 Li elstaris en ludkampo ; en heroduel' ; ŝiras grandajn kverkotrunkojn ; sendas kelkajn al Hel.

'49 Sidigas la fraŭloj sin ; koleraĵ ili estis ; "Vian prefere venĝu patron ; ol tiom nin molesti."

'50 Sigurd ĵetas ŝildon ruĝan ; malsupren al la tero ; aŭdinte morton de sia patro ; nigriĝis li en kolero.

< Sigurda runŝtono en Drävle, Svedujo. >

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (9):

'51 Ĵetas glavon kaj luktvestojn ; ne plu lin amuzas ludo ; kaj eniras al sia patrino ; kun vangoj en pala ruĝo.

'52 Knabo iras al panjo sia ; parolas en rekta elano ; "Diru min pravon patran, ĉiu ; scivolas pri sia klano.

'53 Nun aŭskultu bena panjo ; diru el emajlo ; vivon de patro ĉu prenis iu ; aŭ mortis li sur pajlo*?

'54 Aŭdu mia bena patrino ; demandas mi al vi ; ĉu mia patro veka venkiĝis ; kaŝe estas al mi.

'55 Aŭdu bena mia patrino ; veron diru al mi ; kies estis tiu nomo ; venkis patron li?

'56 Aŭdu mia bena panjo ; diru al mi de l' benko ; ĉu li ankoraŭ estas monde ; kiu patron venkis?"

'57 "Se en mondo pluas kiu ; vian patron venkis ; estos ne dum vivas vi ; ke li vin rekompensas.

'58 Mi ne povas pli vere ; ol ĉi diri vin ; tiuj estis Hunding-filoj ; kiuj venkis lin.

'59 Tiuj estis Hunding-filoj ; kiuj venkis lin ; estos ne dum vivas vi ke ; ili kompensas vin."

'60 Sigurd respondas al patrino ; pove laŭ siaj sentoj ; "Ofte kreskis al juna hundo ; buŝe akraj dentoj."

'61 Hjordujs iras al la kestoj ; ĉiuj en ora garno ; "Jen vi vidas batalvestojn ; de via patro en armo."

'62 Ŝi malŝlosas la kestojn ; kun ora atribuo ; ŝi elprenas la glavopartojn ; kaj ĵetas al Sigurd-genuo.

'63 Ŝi elprenas la ĉemizon ; tute sangmakulan ; "Jen vi vidas, bena filo, ; vian patran tumulon."

'64 Ŝi malŝlosas la keston kie ; oro kaj aĵoj sekretas ; prenas tiun sangan ĉemizon ; kaj al lia genuo ĵetas.

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (10):

'65 Prenas ŝi la glavpartojn ; al Sigurd donas ŝi ; "Donis via bena patro ; ja multan bonon al mi.

'66 Prenu vi ĉi tiujn ; glavpartojn du ; lasu forĝi ilin al ; sambona substitu'.

'67 Regin forĝisto loĝas ; ĉe venonta flu' ; al li vi portu ; ĉi glavpartojn du.

'68 Al li venigu vi ; ĉi glavpartojn du ; forĝu li bone kaj valore ; ĝis vi rajdos plu.

'69 Akra nomiĝas drako ; kuŝas sur Brileriko ; Regin estas bona forĝisto ; perfido lia praktiko.

'70 Iru al rapidfluo, vi ĵetu ; ŝtonon en riveron ; tian elektu ĉevalon kun ; malfuĝa karaktero."

'71 Iris al rapidfluo, li ĵetis ; ŝtonon en riveron ; tian elektis ĉevalon kun ; malfuĝa karaktero.

'72 Li elektiĝis en la regno ; neniu lin egalas ; poste jam nomiĝis li ; Grizo, Sigurda ĉevalo.

'73 Frue estis en mateno ; mi memoru pove ; Sigurd celas trans riveron ; forĝiston Regin trovi.

'74 Sigurd saltas al Griza dorso ; mateno nuras novi ; poste rajdis li trans riveron ; forĝiston Regin trovi.

'75 Estis juna Sigurd ; rajdas al pordo kabana ; Regin ĵetas forĝaĵojn ĉiujn ; kaj prenas glavon en mano.

'76 "Aŭdu brava Sigurd ; vi estas kuraĝa viro ; vojaĝas kien vi ; kien rajda iro?"

'77 "Nun aŭskultu Regin ; ĉi tien mia iro ; forĝu por mi glavon nun ; jen mia deziro."

'78 "Estu bonvena, juna Sigurd ; min kara estas vi ; se restos en regno iom da tempo ; vi estu ĉi nokte ĉe mi."

'79 "Mi ne povas, forĝisto Regin ; resti jen ĉe vi ; mankos mi al Hjalprek reĝo ; el la kortumo ĉe li.

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (11):



'80 Forĝu glavon vi por mi ; bonvalora afero ;
ambaŭ fendos mi per ĝi ; kaj ŝtalon kaj feron.

.....

'81 Forĝu glavon vi por mi ; brilan en fasono ;
ambaŭ fendos mi per ĝi ; feron kaj ŝtonon."

'82a Regin je la glavo prenis ; metis ĝin sur
ardon ; dek noktojn tenis ; li ĝin tie garde.

'82b Regin je la glavo prenis ; metis ĝin
enflame ; dek noktojn tenis ; li ĝin ĉiam same.

.....

'83 Dek noktojn tenis ; li ĝin ĉiam same
; tiam juna Sigurd for ; rajdinta estis
jam.

'84 Frue estis en mateno ; suno brilas
nove ; Sigurd saltas al Griza dorso ;
forĝiston Regin trovi.

'85 Sigurd saltas al Griza dorso ;
mateno nuras novi ; poste rajdis li trans
riveron ; forĝiston Regin trovi.

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (12):

'86 Estis juna Sigurd ; rajdas al pordo kabana ; Regin ĵetas ĉiujn forĝaĵojn ; kaj prenas glavon en mano.

'87 "Estu bonvena, Sigurd ; forĝis mi glavon ; se vin ne nocas menso kaj koro ; vi estos venkohava.

'88 Forĝis glavon mi por vi ; brilan en fasono ; ambaŭ fendos vi per ĝi ; feron kaj ŝtonon."

'89 Sigurd iras amboson grandan ; firma grundo atendis ; rompe sian glavon ; en partojn du li fendis.

'90 "Morton de mi, Regin ; vi meritas ĉar ; min perfidi volis vi ; per via armilfaro."


'91 Ambaŭn prenas li glavpartojn ; ĵetas al lia sino ; tremis Regin forĝisto ; kiel lilifolio.

'92 Ambaŭn prenas li glavpartojn ; ĵetas al lia mano ; tremis mano de Regin ; kiel lilia kano.

'93 "Forĝu vi alian glavon ; sed tiel forĝu ĝin ; sciu vi Regin ; vivo ne restos vin.



& Sigurda balado. Forĝisto Regin (13):



'94 Glavon vi faru tiom ; forta
en tolero ; ambaŭn fendos mi
per ĝi ; kaj ŝtalon kaj feron."

.....

'95 "Forĝos mi alian glavon ;
estos ĝi sufiĉe ; koron de la
drako ; metos mi kondiĉe.

'96 Por vi juna Sigurd ; forĝos
mi na glav' ; koron de la drako
; vi donu al mi por pag'."

'97 Regin je la glavo prenis ;
metis ĝin enflame ; tridek
noktojn tenis ; li ĝin ĉiam
same.

'98 Tridek noktojn tenis ; li ĝin
ĉiam same ; tiam juna Sigurd
for ; rajdinta estis jam.

'99 Sigurd saltas al Griza
dorso ; mateno nuras novi ;
poste rajdis li trans riveron ;
forĝiston Regin trovi.

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (14):

'100 Estis juna Sigurd ; rajdas al pordo kabana ; Regin ĵetas ĉiujn forĝaĵojn ; kaj prenas glavon en mano.

'101 "Estu bonvena, Sigurd, ; kia via atendo? ; bonan havos vi superon ; laŭ ĉies rekomendo.

'102 Estu bonvena, Sigurd ; forĝis mi na glav' ; se vin ne nocas menso ; vi vaste vojaĝos brava.

'103 Forĝis glavon mi por vi ; brilan en fasono ; ambaŭn fendos vi per ĝi , feron kaj ŝtonon."

'104 Sigurd iras amboson, hakas ; ĉion en rigardo ; nek eltenas klaboroj nek traboj; al tiom glava hardo.

'105 Tiel hake li Sigurd ; forte batis ; fendis li amboson ; kaj la fundon dis.

'106 Kuras rivero el tiu fonte , alia ĉe la flanko ; Gram nomas li glavon ; kuŝantan sur halplanko.

'107 "Aŭdu glora Sigurd, ; edzinon serĉas vi ; por simila ĉefo ; donos vivon mi."

'108 "Nun aŭskultu Regin ; ĉi tion vi diras al mi ; sed alio kuŝas koron ; forĝisto Regin, de vi."

'109 "Tion ĉi, brava Sigurd ; diru vi min ; kiam vi rajdos Brilerikon ; lasu min sekvi vin."

'110 "Unue rajdos mi aŭrore ; Hundingfilojn trovi ; poste rajdos mi Brilerikon ; memoron mi ŝatas kovi.

'111 Unue rajdos mi aŭrore ; Hundingfilojn faligos ; poste rajdos mi Brilerikon ; vi ne kun mi navigos."

'112 Estis Sigurd Sigmundido ; ne mankas al li bonsorto ; rajdis li tiam en aŭroro ; sin venĝis patran morton.

'113 Rapide li venkis Hunding-filojn ; revenis li poste fortika ; hastan horon restis li ; li rajdis al Brileriko.



& Sigurda balado. Forĝisto Regin (15):

'114 Ĉiujn venkis li Hunding-filojn ; venis li re sen piko ; mallongan tempon estis en regno ; li rajdis al Brileriko.

'115 Trompulo Regin forĝisto ; pensas mem en si ; "Celas vi al Brileriko ; vin postsekvos mi."

'116 Estis Sigurd Sigmundido ; rajdas trans arbaro ; lin renkontis maljunulo ; eksidis apud pado.

'117 Venis viro sur kampo antaŭen ; jam nenia rimarko ; vastan ĉapelon kape portis ; en manoj finna arko.

'118 Venis viro sur kampo antaŭen ; strebis li montorande ; havis okulon unun en kapo* ; butonpantalanon gambe.

'119 Estis la juna Sigurd ; al Brileriko kuras ; renkontis maljunan viron ; meze sur la spuro.

'120 Estis la juna Sigurd ; sursidis bonan ĉevalon ; tiel diris filoj al mi ; lin batis la fatalo.

'121 "Aŭdu Sigurd Sigmundido ; vi estas alta viro ; vojaĝas kien vi ; kien rajda iro?"

'122 "Unue mi rajdis al ŝilda bruo* ; la Hunding-filojn trovi ; nun mi rajdas al Brileriko ; faman lukton provi."

'123 "Aŭdu alta Sigurd ; diru vi al mi ; kiu estas malgranda homo ; sekvanto jen kun vi?"

'124 "Forĝisto Regin li nomiĝas ; drakofrata viro ; ĉar mi havas lin ĉe mi ; dum ĉi tiu mia iro."

'125 "Kiu vin petis fosi ; du truojn ĉi ; morton tiu sama homo ; generis por vi."

'126 "Regin al mi konsilis ; fosi truojn du ; ĉar li estas mia amiko ; dum tiu ĉi veturo."

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (16):

'127 "Se vin konsilis Regin ; fosi truojn du ; estas li fiperfidulo ; mortigi vin faros, nu.

'128a Bone Sigurd devas vi ; havi je atento ; ke ne donu al vi morton ; tiu ĉi serpento*

'128b Bone Sigurd devas vi ; gardi je atako ; ke ne donu morton al vi ; tiu granda drako.

'129 Fosu vi nun truojn du ; kaj trian apude, ho, ; efiko de l' veneno ; ĝin varmigu do.

'130 Fosu vi la trian ; vi fosu ĝin proksime ; efiko de l' veneno ; fortigos vin anime.

'131 Fosu vi truojn kvar ; se lacigos vin atako ; gardos vi vin per tio kontraŭ ; venensango draka.

'132 Fosu vi la kvaran ; iom pli longe for ; supren el la truo ; luktos vi lin rigore.

'133 Fosu vi la kvaran ; vi fosu ĝin apude ; poste vi Sigurd ; staru en tero kruda."

'134 Drako iris de la oro ; vasta famo deklaras ; Sigurd sidiĝas sur Griza dorso ; rajde sin preparas.

'135 Drako iris de la oro ; ŝajnas en sekuro , Sigurd palpas vundosagon* ; por glava proceduro.

'136 Tridekulna akvofalo ; sub ĝi kuŝis drako ; kapo kaj vosto sur la tero ; kuŝis kurbe lokon.

'137 Tridekulna akvofalo ; sub ĝi kuŝis drako ; supre estis ambaŭ bridoj ; kuŝis ventro lokon.

'138 Supris liaj ambaŭ bridoj ; sed ventro lokon kovis ; estis la brava Sigurd ; li sian glavon ŝovis.

'139 Estis rapida Sigurd ; glavon tiris en tru' ; buntan drakon fendis li ; en disajn partojn du.

& Sigurda balado. Forĝisto Regin (17):

'140 Sigurd donis hakon belan ; al ĉiuj tre mirenda ; tremis tiam frondfolioj ; kaj tuta mondetendo.

'141 Tremis tiam frondfolioj ; tuta mondetendo ; Sigurd per sia akra glavo ; hakis talion fende.


'142 Tiam drako demandis ; kiam li kuŝis rompe ; "Kiu estas la kuraĝulo ; hakanta tiom aplombe?"

'143 "Sigurd vi nomu min ; Sigmunda filo ; estis la juna Hjordujs ; ŝi lia edzino."

'144 "Nun aŭskultu Sigurd ; kion mi diras al vi ; kiu vin sekvis vastan vojon ; tien ĉi al mi?"

'145 "Regin estas via frato ; voje li min gvidis ; li plej granda perfidulo ; mortigi vin avidis."

'146 Tion respondis drako ; en sange kuŝa stato ; "Mortigu vi forĝiston Regin ; kvankam mia frato.



& Sigurda balado. Forĝisto Regin (18):

'147 Venku vi forĝiston
Regin ; kiel vi venkis min ;
li plej granda perfidulo ;
mortigi volis vin."

'148 Diris Regin forĝisto ;
je sia intereso ; "Ĉu al mi
nun Sigurd ; vi donos laŭ
promeso?"


'149 Sigurd pikis al la koro
; kvankam vojo dura ; fritis
ĝin sur stango ; tridek
ulnojn mezura.

'150 Sigurd mane tro
varmiĝis ; tuj en buŝon
tiris ; birdojn li kaj bestojn
ĉiajn ; komprenis kion
diris.

'151 Diris al li sovaĝaj birdoj
; sidis sur kverka branĉo ;
"Por vi mem Sigurd ; estu
viando manĝo."

'152 Sigurd rostis koron ; kaj
tiris ĝin de l' stango ; Regin
kuŝiĝis drinki ; el draka
venensango.

'153 Regin kuŝis drinki ; el
sango de la drako ; Sigurd
morten vundis lin ; per tie
stara hako.



& Sigurda balado. Forĝisto Regin (19):

'154 Estis la juna Sigurd ; glavon svingis plu ; poste li fendis forĝiston Regin ; en disajn partojn du.

'155 Multan oron povis tiam ; Sigurd ekposedi ; ĉar li venkis la buntan drakon ; kiu Brilerike predis.

'156 Frue estis en mateno ; ruĝas antaŭ suno ; ligas li sur Grizan dorson ; orkestojn dek duujn.

'157 Dek du orkestojn ŝarĝe ; li metis post akiro ; supre li eksidis mem ; laŭ onia diro.

'158 Sin sidigas Sigurd ; rajde sur la meto ; Griza kuris sur erikejo ; tiam estis preta.

'159 Dek du orkestojn ; ambaŭflanke ŝarĝa ; kuris li trans Tilirojo ; famo min venis larĝa.

'160 Griza saltis trans fosaĵon ; rompiĝis rimeno ; kelkaj diris al mi tion ; estis fatalveno.

'161 Kuris ĉevalo en sovaĝejo ; ne konis vojon ĝustan ; Sigurd dormis en tiu nokto ; sub malvarma arbusto.

'162 Tiel tretas Griza ; ebene ŝtonan valon ; Neniu venas tia poste ; en riĉan reĝan halon.

'163 Nun baladon finos mi ; ne kantas mi jam favore ; poste ekos alian kanton ; kaj metos ĝin plu memoren.)

30/69



Sigmund Brestisson

Kristanigis feroajn
insulojn en jaro 999
laŭ komisio de
norvega reĝo Olavur
Trygvason.
Do sanktulo


Vivis inter jaroj 961-1005.
Naŭ(?)jara senpatriĝis en batalo.
Juna servis en Norvegujo dukon,
rabvojaĝis al Svedujo kaj Rusujo.
Kontraŭulo Trond el Gøta (Geŭto)

Ne tradukitaj pri li:
& Randvers kvæði
& Leivs kvæði (Leivur Øssursson)
kaj aliaj

Tradukitaj:
& Bresta balado, 1740 paŝoj.
& Sigmunda balado malnova, 2829.
Djurhuus (1708–1775):
& Sigmunda balado pli nova, 2366.



Feroaj Insuloj



& Bresta balado (Brestis kvæði):

<Filmo 15>

< Rekante 15 el 29 batoj oblaŭ 60 strofoj, entute 1740 paŝoj dum 19 minutoj.

Norda Kantaro #4408. El feroa tradukis Martin Strid.>

(# Melodio: <1,6:29>

(#Verse: /doTi re3do doTi Ti; La3La LaaLaMi La; LaTi doTi TiTi Ti;Ti TiTi Tire do;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)x60)+(& Strofoj:

& Bresta balado (2):

'1 /Frue estis en maten' ; suno ruĝas en mar' ; Bejno domon eniris ; al Bresto, dorma kar'.

(x:; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro bele taga ; Venu en alta somertemp'!**)

'2 "Ekstaru Bresto, mia frato ; suno ore brilas ; blovas neniun vento sur ondo ; kaj maro nun trankvilas.

'3 Serĉu iron al Eta Dujmo* ; bordo ne ŝaŭme blankas ; pli neniam bonis tago ; kapti ŝafojn mankajn."

'4 Ŝnurojn prenis kaj rimenojn ; zone fiksis glavojn ; malsupren al strando iris ; postsekvis du knaboj.

'5 Diras Sigmund Brestofilo ; li naŭ vintrojn aĝas ; "Iros mi al Eta Dujmo ; vidi ŝafojn sovaĝajn."

& Bresta balado (3):

'6 Respondis Toro Bejnofilo ; dek du jarojn plenis ; "Patro, iru vi al Dujmo ; lasu min kunveni!"


'7 "Kion vi sur Dujmo farus ; mallargâs grimpopadoj ; kaj profundas rokabismoj ; vi malaltas, knaboj."

'8 Respondis Sigmund Brestofilo ; kreskis en konkludo ; "Kiu kreskas ĉe cindro ene* ; taŭgos malmulte ludon*."

'9 "Veron li diras mia filo", ; Bresto ekis vortojn ; "Neniu malhelpu bravan ; menson de junforto."

'10 Prenis boaton el densa nesto ; maro al ili ĝemis ; knaboj sidiĝis en la poŭpon ; kaj estroj ekremis.

'11 Al insulo ili eniris ; teren tiris boaton ; kaj antaŭen suriris monton ; kun krutega pado.



& Bresta balado (4):



'12 Piedviglaj kaj ungfiksaj ;
nenion malkuraĝas ; vigle kuras
rokfalrandon ; preni ŝafojn
sovaĝajn.

'13 Kvincent ŝafoj sur insulo ;
Eta Dujmo restis ; nigris ĉiuj
karbaturfe ; speco konata estis.
.....

'14 Rapidaj kiel sovaĝaj birdoj ; en
printempalveno ; oni diras ke hvalbanoj* ;
ĉiajn specojn prenis.

'15 Ŝajnas al mi kolerige ; tia gregdetru' ;
unuajn ŝafojn en Ferooj ; ŝatus mi vidi plu.

'16 Tute bone taŭgis estroj ; sovaĝŝafojn ĉasi
; iras al boato malsupren ; kun kaptaĵo pasi.

& Bresta balado (5):

'17 Tenis* antaŭen al Granda Dujmo* ;
hejmatingon celis ; vidas tri fortikajn
ŝipojn ; kontraŭ ili veli.

'18 Da kirasoj tri dekduojn ; prue
nombris ili ; glimas lancoj, oraj kaskoj ;
glavojn suno brilis.

'19 Bresto diris vortojn tuj ; bonis li
valora ; "Bone konas mi la velojn ; kaj
drakpruon* oran.

'20 Aŭdu Bejno, mia frato, ; kiel nin
konsili? ; Tiuj estas viroj kiuj nin ; volas
malutili.

'21 Unue velas Havgrimo ; kaj Geŭta*
Trondo due ; antaŭ ol trihora* fino ; ni
anhelos skue.

'22 Unue velas Havgrimo ; laste velas
Bjarno ; pre* ol sun' en maron sidas ;
sangos nian feron karno."

'23 Baldaŭ tuŝos tajdmarfluon* ; misas
la destin' ; Rektokon atingos ni ; kaj
venos en Ravin'.

'24 Venos ni en pado supren ; povos
ĝin defendi ; hakos la heroojn kiuj ;
volas vundojn vendi."

'25 Al tio respondis Bejno forta ; li bone
saĝis mem ; "Ni nin tenu ĉe insulon ;
kaj prenu duran remon.

'26 Tenu al venonta kabo! ; Atingeblas
tero! ; Ne sin laŭdos ili ke ; facilis la
konkero!"


& Bresta balado (6):

'27 Tenis ili al insulo ; poste militŝip' ; du videblis konkursremi ; blankis ŝaŭma vip'.

'28 Brakoj ruĝas, vizaĝoj ruĝas ; forte tendenoj ŝvelas ; remiloj kurbas, remingojn turbas ; ŝaŭmon pruo pelas.

'29 Akre enŝprucis boatrando ; okcidenta vento ; trafo sur malflusan ŝtonon* ; rompis boatbendon.

'30 Sigmundo kaj Toro junaj ; ne malfruaj ekis ; kuris ili sur la teron ; Bresto kaj Bejno sekvis.



& Bresta balado (7):

'31 Iris ili al la roko ; kiuj sciis
grimpi ; supren levis do la
knabojn ; kaj metis ilin simple.

.....

'32 "Aŭdu, Bejno, mia frato! ;
Staros jen batalo. ; Kelkaj
Helon* alveturos ; antaŭ nia
mortfalo!


'33 Prenu vi la sudan flankon ;
alte eblas firmi ; staros norde
mi, kaj tie ; malfacilas ŝirmi."

'34 Havgrimo kaj kampul-Bjarno ;
rokon iras antaŭen ; Trondo kun
siaj sekvofraŭloj ; bordon* vagas
ĉirkaŭen.

'35 Provi volis fortaj knaboj ;
rapide ataki ; fratoj akre kaj
masakre ; sangofluen hakis.

'36 Fratoj sciis glavojn flegi ; ludon
bone konis ; ruĝiĝis kirasoringoj* ;
palon al vangoj donis.

& Bresta balado (8):



'37 Fajro fumis el glaveĝoj ; ŝtalon
ŝtalo klakas ; korpoj falis kvin
malsupren ; cerbo roke flakas.

'38 Bejno hakis morten duujn ; trian
forta Bresto ; puŝis for aliajn ĉiujn ;
ĝojis ne moleston.

'39 Tiam Havgrimo koleris ; turnis sin
al Trondo ; "Kial vi malflusaŝafe ; vagu
strandon ondan?

'40 Tial al vi mi teron donis ; ke vi
batalu klinge ; kial vi lasas, kaj tuta
trupo ; glavojn pendi inge?"

& Bresta balado (9):

'41 Ruza estis Geŭta
Trondo ; respondo ne
mankis lin ; "Multan vi
havemas teron ; por
pelte kovri vin!

'42 Vi heroo nomu
vin ; stulta vi estas
prave ; vi ne povas
per du dekduoj ; sur
du viroj venkon
havi!

'43 Vi rikoltu triston,
mokon ; kaj longe
ĝin ricevos ; trupo
kuris al du viroj ;
kaj fantomi devos.
.....

'44 Se vi inter viroj validu ;
kaj ne mankas em' ; iru
rokon vi unue ; kaj montru
taŭgon mem!"

'45 Koleriĝis Havgrimo
; preter la maltimo ;
kuris kontraŭ Bresto
supren ; kun lanco en
proksimo.



& Bresta balado (10):

'46 Lanco glitis en talion ; ŝtalo
femurprofundon ; Bresto faris finan
trukon ; sentis mortigvundon.

'47 Premis li sin sur pikon plu ;
gambo sangon lanĉis ; hakis forte
Havgrimon ; ŝultron, brakon
detranĉis.

'48 Morta falas Havgrimo ; kaj Bresto
super lin ; Bejno luktis vire lerte ;
tamen falis fine.

'49 Toron fluis larmo vange ; duriĝis
Sigmund kore ; "Ni ne ploru, ho fratul'
; sed kaŝu bonmemore!"

'50 Tretas Trond sur batalejo ; li
vortojn bone lasis ; "Venkas ne en ĉiu
vintro ; en Valhal* pli bonas ĉasi.

'51 Sperti devas ĉi herooj ; iri
Bifrosten* for ; morti devos ĉiu homo
; sed ne lia glor'.

'52 Eblas ne ke luktan
ludon ; fermas fino jama
; knabojn prenu ni por
sendi ; al la vojo sama."

.....

'53 Svejno ingan glavon
tiras ; Bjarno diras en
rapido ; "Ŝajnas min
fiago hunde ; mortigi
homidojn.

'54 Devus knaboj ja ricevi ;
pacon inter viroj." ; Multaj ŝatas
Bjarnajn vortojn ; sed Trond
alioŝi diros.

'55 "Saĝa homo antaŭatentas ;
knabojn haku sen graco! ;
Kreskos ĝis luktuloj ili ; al ni ne
ofertos pacon."

& Bresta balado (11):



'56 Koleriĝis Bjarno tiam ;
"Estu vi maltotem!"* ; Ne
mortigu vi la knabojn ; ol min
prefere mem!"

'57 "Tio ne estis mia volo" ;
Trondo vortriparas ; "Mi nur
volis provi kie ; via penso
staras.

'58 Manĝon ofertas mi al ili ;
kaj aliajn favorojn ; mem
edukos ilin mi ; instruos
leĝojn kaj morojn.

'59 Instruos sporton kaj
armludojn ; poemojn kaj
rakontojn." ; Ĉiuj bataleje
starantoj ; ŝatis nun ruĝan
Trondon.

'60 Estrojn ili nun honore ;
kampe enterigis ; Trondo kun
si prenas knabojn* ; kaj
norden al Geŭto navigis.)

44/69



& Sigmunda balado malnova (Sigmundskvæði eldra)

<Filmoj 34, 35>

(#: (# Unua parto: <:31> (/mi mi dolre mi mi mido re lfa; mimimi mimimi mido re lfa; mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)x25)+(&:

'1 /Norvege2 loĝas brava ho2m' ; Olavo Trigvafil' lia no2m'.

(x:; **Norvegoj, dancu nun trankvile*** ; ĉiuj ni trankvilas ; rajdistoj, norvegoj ; dancu nun trankvile.)

'2 Olavo2 reĝo ĥriston donacas ; dion kaj novan mildan gracon*

'3 Olavo2 vokas al fraŭloj du2 ; "Venigu Sigmundon en jarfru2'."

'4 Antaŭ o2l ili duondiri kapablis ; Sigmund jam estis endome ĉetable.

'5 Sigmund fa2ligas sur genuojn si2n* ; "Ĥristbenon, kion vi volas mi2n?"

'6 La reĝo2 prenas Sigmundan manon ; "Mi vin donas duonon de Feroa lando.

'7 Vi vo3jaĝu al Ferooj vaste ; kaj vin sekvos Tangbrañd pastro.

'8 En Ferooj loĝas finna homo ; Trondo en Geŭto* lia nomo.

'9 Trondo e2n Geŭto lia nomo ; kara Sigmund, igu al mi l' homon."

'10 Sigmundo2 tiel ekparolas ; "Li ne facile al vi volas."

'11 "Ĉu esta2s li fortika luktulo ; aŭ li estas sorĉmanipula?"

'12 "Ne esta2s li fortika luktulo ; pli li estas vergmanipula*."

'13 Iris i2li laŭ sabla strando ; kie ŝipoj naĝas marorande.

& Sigmunda balado pli nova (Sigmundskvæði yngra)

(# Unua parto: <:31> /mi mi dolre mi so soosomi re Iso; soososo so3so fami re lfa; (# Rekantaĵo unua: mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)×34)+(&: <Filmo 34>

'1 /En Ferooj loĝis du estraj homoj ;
Trond kaj Sigmund iliaj nomoj.

(x: **Norvegoj, dancu nun
trankvile*** ; ĉiuj ni trankvilas ;
**rajdantoj, norvegoj ; dancu nun
trankvile.**)

'2 Sigmundo2 loĝis en Skuvo torfa ;
Loĝis Trond ĉe Geŭta golfo.

'3 Kolera2s Trond, li pensas
minacon ; Sigmund forverŝis nian
donacon.

'4 Trond sida2s en sia domicilio ;
"Venigu Ŝeŭron Tolakfilon.

'5 Venigu2 Gutaon kaj Toron ĉapan ;

'6 Envenis knaboj kaj tiel diras : ;
"Kion vi, Trond, de ni deziras?"

'7 "Mi lasis al vi mesaĝon porti ; por
ke vi helpu ke Sigmund mortu.


'8 Lancojn akriĝu, tranĉilojn akriĝu ;
pri vivo de Sigmund ni intrigas.

'9 Ĉi mia konsilo bone bakos : ; Lin
ĉi nokte ni atakos."

'10 Ili kolektis fraŭlojn kaj virojn ; kaj
ĉiuj kune al bordo iras.

'11 Kaj veli2s Trond Skuvojafjordon
; ŝipo kurbiĝis kiel selkordo.

'12a Nokto malhelis kaj ŝipo iris ; ja
mildan ŝarĝon Trond akiris.



Batalo ĉe Svolder (1000)

Tri reĝoj:

danoj Svend Tveskæg (Dubarba)

sveda Olof Skötkonung (Sinoreĝo)

norvega Olaf Trygvason (Trigvafilo)



VESTERLED
(Okcidenten)

norvegoj

svedoj

danoj

Svolder,
Svolder

ÖSTERLED
(Orienten)

& Drako Longa (Ormurin langi):

< Verkis Jens Christian
Djurhuus (1773-1853).>



<Filmoj 32, 55>

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2523 paŝoj dum 27 minutoj.> (#: <1,6:29>
(#**Strejmoja**: omi /miimimi mire redo dodo; dododo dore mimi; mimi mimi mire mimi;
soso fami mimi; (#**Rekantaĵe**: redo re rere mire; do rere re; rere mire doTi La;So So LaTi
do)) ? (#**Varianto B**: odo /doododo dore doTi LaSo; dododo dore mimi; mifa mire remi
mifa; mire remi fa; (#**Rekantaĵe**: mido re rere mire; do rere re; rere mire doTi La;So So
LaTi do)) ? (#**Suduroja**: odo /dooSoSo LaTi dodo dooTi;Ti TiLa LaSo SoMi; SoSo LaTi
dodo doTi; TiLa LaSo LaSo; (#**Rekantaĵo**: MiSo So FaMi redo; do dodo re; rere mire
doTi La;So So LaTi do)))x87)+(&:

& Drako Longa (2):

'1 Ĉu /volas vi odon aŭdi mian ; ĉu volas vortestimojn? ; Pri Olavo Trigvafilo* ; jen sin turnos rimoj.

(x:; **Bruas danco en halo; dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj rajdas norvegoj ; al luktku2nven'.**)


'2 Konstrui ŝipon igas reĝo ; jen sur sabla strando ; Drako Longa plej granda estis ; farita en norveglando.

'3 Fariĝis ŝipo en norveglando ; bonis en ĝi konstruo ; dek ok ulnojn kaj kvardek estis ; kilo inter pruoj*.

'4 Orumaj estis ambaŭ pruoj ; bluaj tabuloj estis ; orajn ŝildojn mastoj havis ; ja rakontoj atestis.

'5 Reĝo sidas en alta seĝo ; al siaj viroj parolas ; "Ni ekvelos sur sala maro ; mi tion delonge volas.

'6 Nun alportu militvestojn ; kirason kaj glavon gliman ; poste lanĉu ni de l' tero ; kaj velu de norvegreĝimo."



'7 Ĝojaj kaj gajaj la fraŭloj diris ; "Estro, kun vi ni velos ; ĉu vi vojaĝos pace, milite ; ne timas ni ondojn ŝvelajn."

& Drako Longa (3):

'8 Venis viro malsupren de l' montoj ; fortan arkon tenis ; "Pro via jarlo Ringoregna* ; mi ĉi tien venis."



'9 Reĝo tiel ekparolas ; ĝoja jam tiome ; "Diru al mi, vi juna viro ; vi kiu estas nome?"

'10 "Ejnar vi nomu min ; mi povas arkon streĉi ; Tambo nomiĝas mia arko ; sagojn kurigas breĉe."

'11 "Vi aŭskultu juna viro ; ĉu kun mi volas veli ; estos vi sagulo mia ; Drakan defendon celi."



'12 Iris ili strandon malsupren ; riĉaj kaj altkreskaj ; rultrunkojn rompis, tero tremis ; tiris la ŝipon el nesto.

'13 Malvolvis siajn silkajn velojn ; en la maron iri ; estas dirite, la reĝo mem ; li Drakon Longan stiris.

'14 Vaste vojaĝis famo landon ; norvegoj elvelrapidas ; reĝo danuja kaj reĝo sveduja ; kune konsiliĝas.

'15 Reĝo danuja kaj reĝo sveduja ; kunvenis por ofensiv' ; kiel norvegujan reĝon ; igi for de l' viv'.

& Drako Longa (4):

'16 Al Ejrik jarlo mesaĝon ; ili prepare sendis ; li vojaĝon sekvos por sian ; patran morton venĝi.

'17 Ejrik ĉe la reĝoj eniras ; kun ruĝa ŝildo, kiraso ; "Olav reĝo de norvegoj ; mian patron mortigi lasis."

'18 Staras jarlo stokejplanke ; lanco en manoj glimas ; "Olav reĝo vidis ke ; mi akron per akro rimas."

'19 Iris ili al bordo malsupren ; bela kompanio ; reĝo danuja kaj reĝo sveduja ; kaj Ejrik jarlo la tria.

'20 Jen triopo da ŝiparoj ; el Sundo* iris ; Fertirŝip'* unua estis ; povis jarlo stiri.

& Drako Longa (5):

'21 Reĝo danuja ekparolas ; serĉas vortojn pledajn ; "Kiu Drakon Longan prenos ; tiu ĝin posedos."

'22 Ejrik pensas mem al si ; "Ekscios vi malvola ; vi ne prenos Drakon Longan ; per dana potenco sola."

'23 Tiam parolas reĝo sveduja ; tenis tranĉilon boran ; "Mi ĝin prenos Drakon Longan ; aŭ vivon lasos for."

'24 Ejrik staras en larĝa amaso ; ruĝan skarlaton portas ; "Vi ne prenos Drakon Longan ; antaŭe mi diros vin morta."

'25 Ejrik parolas al siaj viroj ; "Luktulojn ni renkontos ; staru bone kaj virece ; ĉar grundo sangiĝontas.

'26 Viroj norvegaj sur reĝa ŝipo ; kapablas tranĉe trivi ; iru antaŭen en dura lukto ; aŭ lasu ni la vivon."

'27 Ejrik parolas al Finno Malgranda ; "Apud mi vi staru ; vi defendos min mem se ; min venas danĝera faro."

'28 Lanĉis ili ŝipojn Sunden ; longe tie gvatis ; sopiris norvegajn ŝipojn ; reĝon norvegan bati.

'29 Lanĉis ili ŝipojn insule ; celis al konkero ; gardon tenis nokte, tage ; por norvega apero.

'30 Nun la baladon finos mi ; ne kantas mi jam favore ; tuj mi ekos alian kanton ; knaboj, metu memoren!

'31 Olavo celas hejmen veni ; de orienta maro* ; kiam li en Sundon venas ; vidas li ŝiparon.

'32 Estroj tri sur strando staras ; vaston vidmeditas ; kaj ekvidas grandan ŝipon ; sur la maro glitas.

'33 Reĝo danuja ekparolas ; "Ĉio min perfektas ; okulojn du min benas Ĥrist' ; nun Drakon mi Longan spektas."

'34 Ejrik staris en proksim' ; al siaj viroj diras ; "La danuja reĝo ; ankoraŭ ne Drakon vidas."



'35 Venis jen pli granda ŝipo ; viroj miras pri ; reĝo sveduja jarlon parolas ; "Nun Drakon vidas mi."

'36 Ŝipon lanĉas nun de bordo ; mane remilojn prenas ; "Ne lasu foriri jam Olavon ; malmultaj egalon tenas!"

'37 Ejrik rigardas al la maro : al siaj viroj diras ; "Ĵuras mi je vera dio ; vi ankoraŭ ne Drakon vidas."

'38a Reĝo danuja kaj reĝo sveduja ; tenas anson ruĝan ; "Ejrik jarlo sian patran ; morton venĝi fuĝas.

& Drako Longa (6):

'38b Reĝo danuja kaj reĝo sveduja ; dubon ili esprimas ; "Ejrik jarlo sian patran ; morton venĝi timas.

'39 Malbonvole la jarlo tiam ; diris kolere ; "Pli ol vortaĉojn vi bezonas ; por norvegojn konkeri.

'40 Ejrik staras sur verda kampo ; kaj li nun ekiras ; "Estu rapidaj al la ŝipoj ; mi Drakon Longan vidas."

'41 Ĉiuj vidis Drakon veni ; miris atribuojn ; oraj estis la buspritoj ; kaj silkaj veloj en pruo.



& Drako Longa (7):

'42 Metis ili sin batalen ; lance kaj perglave ; bolis norvegoj sur Drako ; ilin relukto ravis.

'43 Olav parolas al siaj viroj ; "Aĉetos min ili dure ; neniam timas mi batalon ; hodiaŭ mi ne forkuros.

'44 Vi metu ŝipon al batalo ; malhisu la velojn ; lasu ilin vidi ke norvegoj ; per glavo povas celi!"

'45 Ulvo Ruĝa en pruo staras ; bonis li kaj brava ; "Ne metu Drakon pli antaŭen ; ĉar pruon longan havas."



'46 Reĝo staras en pobo posta ; vestita en skarlat' ; "Mia pruulo kaj ruĝas kaj timas ; nun mia vida konstat'."

'47 "Reĝo, neniam vi vidos min timi ; mi bone kuraĝas blendi ; Savu vi pobon bone hodiaŭ ; la pruon mi defendos!"

'48 Tiam koleriĝis reĝo ; kaj Ulvo vortojn ekas ; "Trankviliĝu, sinjoro mia ; ĉar penton kolero vekos."

'49 Olav staras en ŝipofundo ; kaj Ulvo vortojn donas ; "Kiu posedas ĉi taŭgan ŝipon ; ĝin mi ankoraŭ ne konas?"




& Drako Longa (8):

'50 Reĝa frato Torkil respondas ; langis li raporton ; "Reĝo danuja kaj reĝo sveduja ; volas vian morton."

'51 "Timaj estas danaj viroj ; iri kontraŭ norvegoj ; prefere ili sidus hejme ; kapti birdajn gregojn.

'52 Pli bone povas svedaj viroj ; oferbovlojn* sumi ; ol eĉ proksimiĝi nin ; ke sango glave fumu."

'53 Olav iris en la pobon ; rege li avantaĝas ; "Kiu posedas ĉi grandan ŝipon ; Drakon baborde naĝas?"




'54 Respondis Hering, bofrato reĝa ; lasis la vortojn fali ; "Posedas Ejrik Hakunfilo ; ĉiuj lin lojalas."

'55 Al ĝi respondis Olav reĝo ; vastas la rakonto ; "Akra estos lukta ludo ; norveg' norvegojn frontos."

'56 Reĝo sveduja Olavon haltis ; en matena fru' ; estis kiel fajron aŭdi ; ŝipojn tondra sku'.

'57 Hakis kaj pikis norvegaj viroj ; per lancoj kaj glavaj klingoj ; dense falis la svedaj viroj ; kiel herbon blovo svingas.



& Drako Longa (9):

'58 Reĝo sveduja krias laŭte ; vokas ilin ĉesi ; "Perdis mi plej multajn anojn ; malĝojas mi konfesi."

'59 Reĝo danuja paŝis antaŭen ; gajni lin instigis ; prenis norvegoj al li direkton ; danojn maldensigi.

'60 Fumo staris ombre supren ; Sundo videble ruĝis ; estas dirite ke danaj viroj ; ili devis fuĝi.

'61 Ejrik antaŭen al Drako haltis ; en manoj glima glavo ; "Olav ne laŭdos sin ke mi ; de li min baldaŭ savos."

'62 Metas ŝipon ĉe ŝipa rando ; neniu fuĝe kuras ; kapoj kaj korpoj en maron rulas ; vido jen terura.

'63 Ejnar staras en batalejo ; kun Tambo, arka nomo ; ĉiun sagon, se pelis arko ; falis iu homo.

'64 Ejnar staras en batalejo ; li ne danĝeron timas ; vidas altkreskan jarlon Ejrikon ; stari rudron proksima.

'65 Ejnar streĉis Tambo arkon ; sagon kordo levis ; sag' superflugis jarlan kapon ; rudra nabo krevis.

'66 Ejnar streĉis alimense ; celis jarlon pafi ; sago flugis mise-dise ; ne povis jarlon trafi.

'67 Ejrik diras al Finno Malgranda ; "Al vi mi parolas ; Kiu estas, per pafoj pikaj ; trafi min li volas?"

'68 Tion respondas Finna Malgranda ; manojn sango gargaras ; "Estas tiu granda homo ; en ŝipa mezo staras."

'69 Diras jarlo iritmense ; "Mi donas al vi motivon ; pafu tiun grandan viron ; danĝeras por mia vivo."

'70 "Mi ne povas la homon fari ; ĉar ne havas li mortmarkon* ; bonŝancas li sed povas mi ; senkordigi lian arkon."

'71 Ejnar streĉis je tria menso ; jarlon por ataki ; kordo rompiĝis de ŝtalo forta ; la arko subite krakis.

& Drako Longa (10):

'72 Ĉiuj aŭdis kordan rompon ; reĝo miras pure ; "Kio ĉi sur mia ŝipo ; tondras tiom terure?"

'73 Respondis Einar Tambaskua ; ĵetas arkon sian ; "El viaj manoj Norvegujo ; rompiĝis, reĝo mia!"

'74 "Ne Tambe sed en Sinjora mano ; mia regno restas ; prenu unun el miaj arkoj ; taŭgaj ili estas."

'75 "Tro malfortas reĝaj arkoj" ; Einar aŭdace deklaras ; "Prenos ŝildon mi kaj glavon ; kaj hakojn mi ne ŝparos."



'76 Plu staris homoj en ambaŭ pruoj ; se mi pravas mense ; estis malĝoje ŝipomeze ; homoj fariĝis maldense.

'77 Ejrik kuris al Drako supren ; glavon mane tenis ; Herning saltis en pobo malsupren ; kontraŭ li poste venis.

'78 Hastis ili ŝipomezen ; povas mi al vi diri ; poste al Fertiro devis ; jarlo retroiri.

'79 Elektis jarlo altajn knabojn ; tiaj maloftegas ; ili tuj surkuris Drakon ; kaj devis Herning cedi.

& Drako Longa (11):

'80 Ulvo Ruĝa el pruo kuras ; nun la pruo ruĝas ; tiom sango sur Drako fluis ; ke ŝipo aspektis ruĝa.

'81 Duris batalo ŝipomeze ; ŝildojn glavoj klakas ; Ulvo kaj Einar, grandluktuloj ; ejrikanojn hakas.

'82 Ejrik estis aliamense ; kiam amaso cedis ; tiam vidis ke la pruon ; Drakan li jam posedis.

'83 Jarlo trian ekon ekipas ; "Lukton plu insistu!" ; Falis tiam Ulv kaj Herning ; kaj tuta la rezisto.



& Drako Longa (12):

'84 Reĝo vokas el la pobo ; "Al ni venas perdo ; saltu en maron, miaj viroj ; fino fariĝos merdo!"

'85 Reĝo elsaltis en la maron ; sekvis la anaro ; reĝa frato lasta estis ; laŭ reĝa volo faris.

'86 Drakon Longan plej kapabla ; Ejrik nun akiris ; prenis li rudron mem en mano ; kaj ĝin el Sundo stiris.)



60/69



& Petro sinjor' kaj Elinborg' (Harra Pætur og Elinborg):

<Filmo 36>

(#: (/LaLa LaLaMi SiSi La; LaLaTi doTi
LaSo; TiTi TiTi TiTi dodo; doTi doTi LaSo
(Rekantaĵo: Ti TiTi La SolFa Mi LaTi do
do;Ti Ti TiTi Mi LaTi doTi La a))x52)+(&:

'1 /Petro sinjor' kaj Elinborg' ; estis infanoj junaj, ; sian amon metis kunen, ; multajn sorto punas.

(x: **Nun emas mi e2n danco jam iri ; dum rozoj, lilioj kreskadas tre.**)

'2 Petro sinjor' kaj Elinborg' ; estis infanoj riĉaj, ; sian amon metis kunen, ; multajn sorto sufiĉas.

'3a Metis li manojn sur ŝian kolon, ; al ŝi milde parolas: ; "Kiom longe vi, Elinborg', ; fianĉino, atendi min volas?"

.....



& Petro sinjor' kaj Elinborg' (2):

'3b Metis li manojn sur ŝian kolon,
; kise ŝin karesas: ; "Kiom longe vi,
Elinborg', ; fianĉino, atendi
promesas?"

'4 "Sep vintrojn atendos mi ; sen
konsento fratula, ; ne edzigos
vivan viron ; dum en mi vivo
brulas.

'5 Sep vintrojn atendos mi ;
kontraŭ fratula ŝato, ; ne edzigos
vivan viron ; eĉ se sin reĝo
svatos."

'6 Petro sinjoro paŝas ; en la ŝipan
sinon: ; "Mi malpermesas al ĉiu
viro ; mian fianĉinon!"

'7 Petro sinjoro paŝas ; ĉe la ŝipa
bivako: ; "Mi malpermesas al ĉiu
viro ; dormi sur ŝia brako!"

'8 Sep vintroj forpasis jam, ; Elin
eksopiras, ; ŝultras sur sin bluan
mantelon, ; al fenestro iras.

'9 Elin' ĉe fenestro staras, ; elrigardas
vaston, ; bela estis la ŝipo, ; sur maro
ŝi vidas maston.



'10 "Bone konas mi la velojn, ; bone
mi konas buspritojn, ; bone konas mi
la ŝipon, ; por Petro sinjoro glitas."

& Petro sinjor' kaj Elinborg' (3):

'11 Elin iras al bordo malsupren, ; for tabulojn malŝlosis, ; bela estis la ŝipo ; kiu ĉe kajo flosis.

'12 "Aŭdu vi, riĉaj komercistoj, ; kion vi havas por vendi?" ; "Ni havas robojn kaj ruĝan skarlaton, ; plej bonajn vi povas mendi."

'13 "Ne pri roboj mi zorgas, ; nek pri ruĝa skarlaton, ; mi malĝojas ĝismorten, ; estas fremduje frato"

'14 "Li ne estas via frato, ; ĉar vi estas paro. ; Li en Danujo loĝas ; regas burgon ĉe maro.

'15 Li en Danujo loĝas, ; je nom' riĉa Petro sinjoro, ; li fianĉas al dana virino, ; ne kiel vi ŝi floras."



& Petro sinjor' kaj Elinborg' (4):

'16 Elin iras de bordo supren, ;
volvas sin en felo, ; iras ŝi en altan
halon, ; sian fraton Ejrikon celas.

'17 "Bone vi sidas, Ejrik, frato, ; nun
min aŭskultu, kara: ; Ĉu vi estos mia
stiristo ; trans la salan maron?"


'18 "Vi eksidu ĉe mia tablo, ; kun mi
hodiaŭ drinku! ; Moro fraŭlina ne estas
veli ; sur maro, laŭ mia konvinko."

'19 Elin sin turnas de halo eksteren, ;
pleje ŝi koleris: ; "Dio ne lasu min vivi
tagon ; pli al vi petojn oferi."

'20 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ; kunen
sidigas en rondo, ; ŝi elprenas tondilon
arĝentan ; hararojn ĉirkaŭtondas.

'21 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ; hararojn
tondas ĉe koloj ; poste instruas al ili
ĉiuj ; jutan kavalirparolon*.

'22 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ; faras
kavalirajn vestojn, ; iras ili malsupren
al bordo ; kie ŝi jam estis.



& Petro sinjor' kaj Elinborg' (5):

'23 Ejrik al la bordo malsupren ; saman tagon iris: ; "Volas mi transalan maron ; vian ŝipon stiri."

'24 "Ne malpli mi vetas ol ; mian arĝentoringon: ; ke neniun vira homo ; ŝipan internon atingos!

'25 "Ne malpli mi vetas ol ; arĝentan krucon mian: ; ke neniun vira homo ; suriros ŝipon nian!

'26 "Ne malpli mi vetas ol ; mian arĝentoĉenon: ; ke neniun vira homo ; sur ŝipan tabulon venos!

'27 Tamen estis Elinborg' ; brave brilas trema ; kaj ĉe rudro stari iras ; kaj servistinoj ekremas.

'28 Sur malhelan maron elremis ; dum monatoj du, ; neniun veteron havis ili ; por vidi teron de pruo.

'29 Sur malhelan maron drivis ; en monato tria, ; neniun veteron havis ili ; por vidi teron ian.

'30 Neniun veteron havis ili ; por vidi teron de pruo, ; antaŭ alta grundagreso ; falis la ondoj bluaj.

'31 Diris mastrino Elinborg' ; per la vorto unua: ; "Ni prefere promesu almozon ; por vidi teron de pruo!"

'32 Kelkaj promesis unun, ; kelkaj promesis duujn, ; tiam levis nebulo sin, ; ili vidis teron de pruo.

'33 Ĉiuj promesis unun kaj duujn, ; Elin triujn promesis ; tiam sin levis la nebulo, ; kaj teron okuloj karesis.

'34a Frue estis en mateno, ; ruĝas monton suno, ; tiam levis nebulo sin, ; ĉe Petrosinjora laguno.

& Petro sinjor' kaj Elinborg' (6):

'34b Frue estis en mateno, ; suno ruĝas valon, ; tiam levis nebulo sin, ; ĉe Petrosinjora halo.

'35 Paskosemajnan la vendredon* ; ili sur maron ekvagis, ; kaj ne venis al tero antaŭ ; sankta Martena tago*

'36a Ĵetas ili sian ankron ; sur blankan sablan fundon, ; paŝas unue Elinborg', ; metas piedon sur grundon.

'36b Ĵetas ili sian ankron ; sur blankan sablobedon, ; paŝas unue Elinborg', ; sur teron metas piedon.

'37 Meze en ĝardeno ŝi ; surŝultrigas felon, ; veste preta tiel iras, ; altan halon celas.



& Petro sinjor' kaj Elinborg' (7):

'38 "Sana vi sidas, Petro sinjor', ; ĉe via larĝa tablo! ; Ĉu ĝentilaj fraŭloj tiel ; vorton teni kapablas?

'39 "Bone vi sidas, Petro sinjor' ; kaj mastrino dana! ; Ĉu ĝentilaj fraŭloj tiel ; tenas promeson manan?

'40 Petro sinjoro de tablo turniĝas, ; arĝentan poton tenas: ; "Dio du okulojn benu, ; pri vi memoro plenas!



'41 Aŭdu, mastrino Inĝibjorg', ; al mi ne koleru, ; dum mi sekvos nevon mian ; en tritaga konkero.

'42 Dum mi sekvos nevon mian ; en tritaga konkero, ; se mi ne venos ĝis la kvara, ; ne min atendu espere!"

'43 Respondis mastrino Inĝibjorg', ; larmo vange venas: ; "Li ne estas via nevo, ; tute mi komprenas."

'44 Respondis mastrino Inĝibjorg', ; larmo vange reflektas: ; "Li ne estas via nevo, ; klare mi tion konjektas."

'45 Respondis mastrino Inĝibjorg', ; per tria vorto finas: ; "Vire estas ŝi vestita, ; havas hararon virinan."

'46 Sekvis ili al bordo sin, ; ĉiuj en kompanio, ; Petro sinjor' kaj Elinborg' ; kaj Inĝibjorg' la tria.

& Petro sinjor' kaj Elinborg' (8):

'47 Inĝibjorg' staras sur blanka sablo, ;
ŝi multege ploras, ; Elin staras en la
pruo, ; ne aŭdas ke ŝin doloras.

'48 "Vivu nun bone, Inĝibjorg' ; dana vi
virin'! ; Mi ricevis fianĉon mian, ; dum
tempo vi pruntis lin!

'49 "Vivu nun bone, Inĝibjorg' ; ĉe
rivero bunte! ; Mi ricevis fianĉon mian, ;
longe mi donis prunte!"

'50 Ploranta sin turnis al sia burg' ;
mastrino Inĝibjorg', ; ĝoja velas Petro
sinjor' ; hejmen kun Elinborg'.

'51 Nupto ilia drinkata estis, ; viglis
vivdestino, ; iris ambaŭ en saman liton,
; Petro sinjor' kaj edzino.

'52 Ĉu orienten, ĉu okcidenten, ; ĉu
mondofinon ekstreman ; - oni venos en
saman liton ; se Dio kunigemas.)



Dankon!

Martin kaj amikoj de Granda Kurlo



<http://tretis.tone.se>

Filmetoj

Filmo 15 Brestis kvæði á Líttlu Dímun (1.13)

Filmo 31 Regin Smiður Ólavsøka (13.14)

Filmo 32 Ormurin langi Týr (6.10)

Filmo 34 Sigmunds kvæði eldra fyrsti táttur (7.27)

Filmo 35 Sigmunds kvæði eldra helvtin av øðrum og triðja tátti (8.00)

Filmo 36 Kvæðadagur í skúlanum á Ziskatrøð (5.26)

Filmo 37 Ólavur Riddararós Harkaliðið (4.42)

Filmo 38 Ólavur Riddararós tað íslenska lagið (12.59)

Filmo 39 Torkils dótur (7.16)

Filmo 40 Jallgríms kvæði Eusturoy (9.17)

Filmo 41 Jallgríms kvæði Suðuroy (7.15)

Filmo 42 Vilmunds kvæði (10.05)

Filmo 43 Virgars Kvæði fyrsti (14.57)

Filmo 54 Kópakvæðið (10.52)

Filmo 55 Ormurin langi (9.22)

